Transitivaj kaj netransitivaj verboj en Esperanto

Christer O. Kiselman

Enhavo:

1. Enkonduko

La distingo inter transitivaj kaj netransitivaj verboj en Esperanto estas bone konata malfacilaĵo. Temas pri gramatika kampo kie Esperanto ŝajnas esti same malregula kiel multaj aliaj, naciaj lingvoj.

Mi starigas la sekvajn demandojn, kaj esperas kontribui al ties respondoj. Ĉu entute indas distingi la netransitivajn disde la transitivaj verboj en Esperanto? Se jes, kiel oni devas difini transitivecon? Kiuj verboj estas pli oftaj, la transitivaj aŭ la netransitivaj? Ĉu ekzistas reguloj laŭ kiuj oni povas formi transitivajn respektive netransitivajn verbojn (krom per *-igi* kaj *-iĝi*, kompreneble)? Kial Zamenhof ne reguligis la aferon? Ĉu entute oni povas vidi iujn regulaĵojn en la verboj rilate al transitiveco?

Por mi la celo de tiu ĉi studo estis unue tutsimple vidi kiel oni formas transitivajn respektive netransitivajn verbojn el aliaj vortoj (el verboj kaj neverboj). Mi volis studi la malregulaĵojn kaj ankaŭ vidi eventualajn regulaĵojn en la formado de verboj rilate al la transitiveco, kaj priskribi ilin.

Dua – kaj evidente multe pli fora – celo estas ioma flegado aŭ normigo de la lingvo: se oni malkovras iun sufiĉe regulan trajton en la formado de verboj, tiam kelkaj aliaj formoj aperas kiel esceptoj, kaj oni povus iom post iom aŭ forgesadi pri ili, aŭ fari iun ŝanĝon. Tiel la lingvo fariĝus iomete pli regula, kaj la lernado iomete pli simpla. Ni fakte vidos ke estas facile fari kelkajn tiajn ŝanĝojn en la klasado de PIV.

La ŝlosilaj terminoj de la verko estas do la adjektivoj *transitiva* kaj *netransitiva*, kiuj estas la nuntempe plej ofte uzataj. Ni povas noti ke Zamenhof, en letero al Th.

Publikigita en *La Stato kaj Estonteco de la Interncia Lingvo Esperanto* (Red. Petr Chrdle), pp. 24–40; Dobřichovice: Kava-Pech, 1995; ISBN 80-85853-08-6. La artikolo estas prilaborita versio de prelego en Prago la 8-an de julio 1994 ĉe la unua kolokvo de la Akademio de Esperanto.

Cart de 1907 02 24, uzis la esprimojn *signifo transira*, *signifo netransira*, *senco transira* (Zamenhof 1983:539). Same PAG enhavas la esprimon *netransira verbo* (Kalocsay & Waringhien 1980, §184). La vorto *transira* estas tre proksima al la latina origino de la vorto *transitiva* (latine *trans* 'trans' kaj *īre* 'iri', supino *ĭtum*).

2. La valento de verboj kaj la sufiksoj *-igi* kaj *-iĝi*

El semantika vidpunkto verbo povas koncerni unu aŭ plurajn personojn aŭ aferojn. Se mi diras *mi ripozas*, nur mi estas koncernata. Se mi diras *mi kompostas artikolon*, kaj mi kaj la artikolo estas envolvitaj en la ago. En la frazo *mi sendos leteron al vi*, la verbo havas tri koncernatojn. Oni diras ke la verbo en tiuj kazoj estas *unuvalenta*, *duvalenta* respektive *trivalenta*. Verbo povas eĉ havi kvar koncernatojn, ekzemple *mi sendigos la leteron al vi per amiko*. Mi uzas la vorton *koncernato* por signi kaj la subjekton kaj la objektojn; ĉilastaj povas esti aŭ rekta (t.e. akuzativobjekto) aŭ nerektaj. La *valento* estas la nombro de koncernatoj, alivorte la nombro de *argumentoj* de verbo (aŭ, pli ĝenerale, de predikato) (Comrie 1983:51). La valento povas esti nula, ekzemple ĉe la verboj *pluvas, neĝas, rosas*.

La diferenco inter rekta kaj nerekta objekto estas unuavice sintaksa, sed respegulas semantikan rilaton: ju pli la ago influas la objekton, des pli tiu tendencas esti rekta. Pri kelkaj verboj la lingvouzo akceptas ambaŭ formojn: oni povas diri same bone *mi dankas vin*; *mi dankas al vi*; simile pri *helpi*: *helpu lin* aŭ *helpu al li*. Se estas pluraj objektoj, tiu el ili kiun la ago plej trafas aŭ ŝanĝas normale fariĝas rekta objekto. Se mi diras *ŝi instruas lin pri botaniko* aŭ *ŝi instruas botanikon al li*, la logika rilato inter la tri koncernatoj estas la sama, sed la emfazo estas iom malsama. La trivalenta verbo *instrui* estas transitiva, kaj povas havi du rektajn objektojn, la instruaton respektive la instruataĵon; oni povas paroli kaj pri instruata persono, kaj pri instruata lingvo. Simile pri *pagi*: oni povas pagi monsumon, sed ankaŭ oficiston. Sed du tiaj malsamspecaj objektoj ne rajtas aperi kiel akuzativobjektoj en unu frazo.

Unuvalenta verbo povas havi nur subjekton. Plurvalenta verbo (t.e. verbo kun valento $\geqslant 2$) havas almenaŭ unu objekton, kaj el la objektoj maksimume unu povas esti rekta. Provizore ni diru ke unuvalenta verbo ĉiam estas netransitiva, kaj ke plurvalenta verbo estas transitiva se ĝi permesas akuzativobjekton (ni vidos pli precizan difinon poste).

La sufiksoj *-igi* kaj *-iĝi* havas klaran efikon rilate al la valento: la unua pliigas la valenton je unu; la dua malpliigas la valenton je unu. Krome ili ambaŭ rilatas al la kaŭzoj de ago. Comrie (1983:158, 161) studas *causative constructions*; la sufikso *-igi* estas ekzemplo de *morphological causative*, dum *-iĝi* estas *anti-causative*. Weidmann (1989:32, 37) nomas la sufiksojn *Kausativmarker* respektive *Antikausativmarker*.

La sufikso *-igi* transitivigas netransitivan verbon: *la akvo bolas*; *mi boligas la akvon*. El unuvalenta verbo oni ekhavas duvalentan.

Se oni aplikas ĝin al verbo kiu jam estas transitiva, ĝi enkondukas novan aganton en la situacion: *mi kompostas artikolon*; *ŝi kompostigas la artikolon*. La unua subjekto *mi* fariĝas nemenciita koncernato en la dua frazo, dum *ŝi* estas la nova subjekto. La duvalenta verbo *komposti* estigas la trivalentan *kompostigi*. Simile el la trivalenta verbo *sendi* estiĝas la kvarvalenta *sendigi*: *li sendas la pakaĵon al vi*; *mi sendigas la pakaĵon al vi* (ne mi sed iu alia sendas ĝin).

Se mi pagigas ŝuldanton, la ŝuldanto pagas; PIV havas nur tiun sencon de *pagigi*. Male, pri *manĝigi* du sencoj estas registritaj en PIV. Se mi manĝigas kokidon, ĉu mi donas al la kokido ion por manĝi aŭ ĉu mi igas iun manĝi ĝin? Ambaŭ interpretoj ekzistas; oni esprimas ilin dirante ke *manĝigi* povas signifi aŭ 'manĝantigi' aŭ 'manĝatigi'. Ekzistas do du eblecoj por la estigo de la frazo *mi manĝigas la kokidon*, la unua laŭ la modelo de *boligi* aŭ *pagigi*:

la akvo bolas → mi igas la akvon boli → mi boligas la akvon,
la ŝuldanto pagas → mi igas la ŝuldanton pagi → mi pagigas la ŝuldanton,
la kokido manĝas → mi igas la kokidon manĝi → mi manĝigas la kokidon;

kaj la dua laŭ la modelo de *sendigi*:

li sendas la pakaĵon → mi igas lin sendi la pakaĵon → mi sendigas la pakaĵon,
li manĝas la kokidon → mi igas lin manĝi la kokidon → mi manĝigas la kokidon.

Cetere oni povas daŭrigi la aplikon de la sufikso: la libro brulis, ĉar iu bruligis ĝin, kaj la reĝo bruligigis ĝin. Tia afero ne estas ofta en Esperanto, sed mi tamen vidis unu ekzemplon, en Tinĉjo (Hergé 1981:15): *Kaj ke mi-mi povas enkatenigigi vin!* (La kapitano povas ordoni al la leŭtenanto enkatenigi Tinĉjon. Konsentite ke la kapitano estas iom ebria, sed la vorto *enkatenigigi* aperas sen ligostreko, kiu indikus balbutadon.) Tamen ni devas akcepti ke *-igi* ne povas esti aplikata al ĉiu transitiva verbo, ĉar ni ne povas amasigi sufiksojn senlime.

La sufikso *-iĝi* povas esti aplikata al transitiva verbo, kaj tiam ĝi malpliigas la valenton je unu, ekzemple *mi fandas la glacion*; *la glacio fandiĝas*. Tiun paron oni komparu kun la paro *mi boligas la akvon*; *la akvo bolas*. Same la trivalenta *sendi* estigas la duvalentan *sendiĝi* (la pakaĵo sendiĝas al iu). Ni notu ke estas la subjekto de la origina frazo kiu estas eliminita per la apliko de la sufikso, dum la origina objekto fariĝas subjekto en la nova frazo.

Sed kio do okazas se la verbo estas unuvalenta? Temas pri formoj kiel *sidiĝi*, kie *sidi* estas netransitiva, do unuvalenta, kaj, se ni akceptas la principon ke *-iĝi* malpliigas la valenton je unu, tiam *sidiĝi* devus esti nulvalenta, kio ne estas ĝusta. Pro tio kelkaj opinias ke verbo kia *sidiĝi*, kvankam fundamenta kaj eĉ troviĝanta en la unua libro (Zamenhof 1887: faldfolio), estas nelogika (vidu Weidmann 1989:38). Por eliri Weidmann mencias du solvojn: aŭ oni konsideras *sidiĝi* kiel simpligon de *sidigiĝi* (kio do konservas la ideon pri valentpliigo kaj valentmalpliigo), aŭ oni diras ke *sidiĝi* tute ne venas de la verbo *sidi* sed de la adjektiva *sida*; *sidiĝi* tiam estas analoga al *ruĝiĝi*.

3. Kiel difini transitivajn kaj netransitivajn verbojn?

Dum la nocio de valento, kiun ni menciis en la antaŭa sekcio, koncernas la semantikon, la nocio de transitiveco rilatas al la sintakso kaj morfologio.

La artikolo de T. Tsunoda en *The Encyclopedia of Language and Linguistics* (1994:4670–4677) enhavas ĝeneralan prezenton de la fenomeno transitiveco. Ĝi estas komplika, kaj nepre, pro tio ke ĝi devas kovri multajn lingvojn.

Pli klasikan difinon oni trovas en Abraham (1988) (tradukite): *transitiva verbo:* duloka verbo kun akuzativa objekto, kiu ĉe pasivigo fariĝas pasivsubjekto; kaj *netransitiva verbo:* unuloka verbo (do sen pasivtaŭga akuzativobjekto) aŭ [...] plurloka verbo sen pasivtaŭga (rekta) akuzativobjekto.

Oni povas difini kvar klasojn de verboj rilate al la ĉeesto de akuzativobjekto:

1. Verboj kiuj ĉiam postulas akuzativobjekton.
2. Verboj kiuj akceptas akuzativobjekton de ĝenerala speco (sed ne postulas akuzativobjekton).
3. Verboj kiuj akceptas akuzativobjekton, sed nur de limigita speco.
4. Verboj kiuj ne akceptas akuzativobjekton.

Laŭ klasika difino oni nomas la verbojn el la unua kaj dua klasoj transitivaj kaj verbojn el la tria kaj kvara klasoj netransitivaj. Ni akceptu tiun difinon ĉi tie. Ni do diru ke *verbo estas transitiva se ĝi povas havi akuzativobjekton de sufiĉe ĝenerala speco; verbo estas netransitiva se ĝi ne povas akcepti akuzativobjekton aŭ akuzativobjekton nur de limigita speco.* Kompreneble en tio kuŝas iom da arbitro: oni ja povus nomi verbojn de la tria klaso transitivaj, sed mi ne vidas iun kaŭzon foriĝi de la jam establita limigo.

Eble estus bone indiki en vortaroj la apartenecon al la klasoj 1, 2, 3, 4.

Al la unua klaso apartenas verboj kiaj *diri*, *certigi*, same kiel *disfendi*, *trakuri* kaj multaj aliaj per prefikso derivitaj verboj.[1] Al la dua klaso apartenas verboj kiaj *manĝi*, *skribi*, al la tria *vivi*, *paroli*, kaj al la kvara *ripozi*, *sani*.

En la tria klaso temas pri verboj kiuj plej ofte estas uzataj sen rekta komplemento, sed kiuj tamen povas havi tian de limigita speco. Ni konsideru la ekzemplojn *iri longan vojon*, *vivi feliĉan vivon*, *dormi profundan dormon*. Oni ĝenerale konsideras la verbojn *vivi, iri, dormi* kiel netransitivajn. Kaj fakte ili ne povas havi akuzativobjektojn tre ĝeneralajn: oni ne povas vivi ion alian ol vivon, nek dormi ion alian ol dormon. Pri *iri* estas iom alie, ĉar oni ja povas iri kaj vojon kaj straton. Tiajn objektojn oni nomas *internaj*, kaj la fenomeno nomiĝas *figura etymologica*.

En la difino de Abraham menciita pli frue aperis la kriterio ke la objekto fariĝu pasivsubjekto ĉe pasivigo. Mi kredas ke tiu kriterio estis enmetita ĝuste por ekskludi verbojn de la tria klaso. Esperanto certe permesas *irota vojo, vivata vivo, dormita dormo*. En kelkaj naciaj lingvoj tiaj formoj ne eblas. Pro tio la testo de pasivigo en tiuj naciaj lingvoj servas al forsarko de tiuj verboj el la klaso de la transitivaj verboj, sed ne en Esperanto. Mi tial anstataŭigis ĝin per la postulo ke la verbo akceptu rektan objekton de sufiĉe ĝenerala tipo.

Aliflanke la verbo *havi* estas konsiderata kiel transitiva, kvankam ne eblas diri en la angla **the book is had by me* post pasivigo de *I have the book*. Do en tiu kazo la pasiviga testo estas tro severa por la angla. En Esperanto ekzistas ja ekzemple *mono havata estas pli grava ol havita*ᶻ (PIV, sub *mono*).

Verbo kiu havas pasivan participon estas aŭ transitiva aŭ netransitiva kun nur internaj objektoj. Plue: verbo kiu ne havas pasivan participon estas nepre netransitiva. Ekzemple ekzistas tri participaj formoj *venkinto, venkito, malvenkinto*, sed ne **malvenkito*. Por kompreni tion ni devas akcepti ke la verbo *venki* povas esti kaj transitiva kaj netransitiva. La netransitiva *venki* akceptas la prefikson *mal-*, sed ne

[1] Elipse tiuj verboj povas aperi sen objekto: se mi demandas *Ĉu ŝi tion diris aŭ skribis al vi?*, la alparolato povas respondi *Ŝi diris*. Tamen elipsojn oni ne konsideru kiel ekzemplojn de normala lingvouzo en tiu ĉi kunteksto.

la transitiva *venki.* En tia kazo estas do necese akcepti du verbojn, unu transitivan kaj unu netransitivan. Sed en aliaj kazoj temas nur pri tio ke transitiva verbo povas aperi sen komplemento: oni tiam diras ke ĝi estas absolute uzata. Ekzemple *legi* estas transitiva, sed povas esti absolute uzata: *Kion vi faras? Mi legas.*

Kroma malfacilaĵo en Esperanto estas kelkaj klasikaj esprimoj enhavantaj pasivan participon de netransitivaj verboj. Aperas en la literaturo esprimoj kiaj *lumitaj fenestroj* kaj *kavita trunko*, kvankam *lumi* kaj *kavi* estas rigardataj kiel netransitivaj. Ni komprenu tion kiel simpligon de la pli kompletaj *lumigitaj fenestroj*, *kavigita trunko.* Vidu PAG, §119.

En la komenco la lingvo estis malpli strikta rilate al la rektaj objektoj. Ni povas legi en la Fundamento: "Anstataŭ la vorto ‚je' ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio. — Mi ridas je lia naiveco (aŭ mi ridas pro lia naiveco, aŭ: mi ridas lian naivecon.)" (Zamenhof 1963:115). Sed tia libereco ne estis akceptita de la posta lingvouzo, kiu limigis la uzon de rekta komplemento kaj ne plu akceptas akuzativobjekton ĉe *ridi.*

4. Opinioj pri la malfacileco de la transitiveco

En la revuo *Esperanto* Golden (1988) kaj Towsey (1989) pledis por pli vasta uzo de la verboj. Towsey demandas kiel oni povus miskompreni la frazojn: *Ne *bolu la akvon ĝis ĝi forbolos!*; *La instruisto komencis la lecionon. La leciono *komencis*; *Li fermis la pordon. La pordo subite *fermis post li*; *Ŝi banas la bebon. Li *banis en la rivero.* Li finas: "Nu, ni ekrulis la pilkon. Ĝi daŭru *ruli!"[2] Lock (1989) komentis ke la vera malfacilaĵo ne temas pri transitiveco sed pri lernado de la signifo de la verboj. Poste ankaŭ Prytz (1989) reagis.

Golden (1991:8) distingas inter "erarhava, subnorma lingvouzo" kaj "elita lingvo, strikte konforma al komplikaj gramatikaj reguloj, kiujn relative malmultaj esperantistoj sukcesas perfekte posedi". Li asertas: "Male, se oni adoptos liberalan sintenon pri gramatikaj demandoj, tiam estos eble simpligi la traktadon de transitiveco en Esperanto kaj akcepti la demotikan lingvaĵon [...]".

Mi tamen devas rimarkigi ke Golden ne montras *kiel* oni povas simpligi la traktadon. Kaj tie kuŝas problemo: konsentite ke parolantoj eraras, sed kion fari pri afero kiu ne estas simpla?

5. Verboparoj en praesperanto

Oni povas demandi sin ĉu Zamenhof konsciis la malfacilecon de la transitiveco. En planlingvo oni ja povus aparte marki la (ne)transitivajn verbojn same kiel oni markas la substantivojn per la finaĵo *-o* kaj la adjektivojn per la finaĵo *-a.* Ŝajnas ke Zamenhof antaŭ la publikigo de Esperanto provis pli skemisman aliron al la vortfarado, precipe pri kelkaj verboj, sed ke li poste forlasis tiujn solvojn.

En artikolo pri la deveno de Esperanto Zamenhof skribas (1948, vol. I:351–354; 1987:20–23): "Mi memoras, ke en la unua tempo mi kun speciala pasio okupadis min

[2] La stelojn, kiuj indikas negramatikan uzon, enmetis mi. Aŭdinte tiujn citaĵojn dum mia prelego 1994 07 08 Michel Duc Goninaz demandis: "Ĉu la Diro 'Oni ne mortigu' nun estu simpligita al 'Oni ne mortu'?"

per serĉado de diversaj 'reciprokaj rilatoj inter la vortoj', kaj ĉiun trovitan rilaton mi fiksis per ia afikso". Li aparte mencias la rilatojn inter la vortoj *doni, preni*; *vendi, aĉeti*; *instrui, lerni*, pri kies tiamaj formoj ni ne multon scias, sed pri kiuj Cash (1992:15) spekulativas.

La plej ampleksa familio de vortoj estis fondita sur la rilato 'fari ion' – 'peni fari tion':

vidi, viti (*vitti*[3]) 'vidi, rigardi',
aŭdi, aŭti (*odi, otti*[4]) 'aŭdi, aŭskulti',
fladi, flati 'senti per la nazo, flari',
palbi, palpi 'senti per palpado, palpi',
gudi, guti 'senti per la gusto, gustumi',
svazi, svasi 'konvinki, peni konvinki',
provi, profi 'sperti, provi[5]',
trovi, trofi 'trovi, serĉi',
pruvi, prufi 'pruvi, argumenti'.

De iom alia karaktero estis la paro

levi, lefi 'levi, leviĝi' (la dua estas netransitiva).

En la nuna Esperanto ni havas, kvankam ne kun la sama rilato kiel en la antaŭaj ekzemploj:

pezi, pesi (la dua estas transitiva),
ŝargi, ŝarĝi (ambaŭ estas transitivaj).

Ĝenerale ne temas pri la kontrasto transitiveco/netransitiveco, sed alia kontrasto. Tamen en la paroj *levi, lefi* kaj *pezi, pesi* unu estas transitiva, la alia netransitiva, kvankam la senvoĉan konsonanton enhavas la netransitiva verbo en la unua paro, la transitiva en la dua.

Multaj ĝermanaj lingvoj havas parojn de parencaj netransitivaj kaj transitivaj verboj (mi donas ekzemplojn el la germana, sveda kaj angla):

liegen, legen; *ligga, lägga*; *lie, lay* 'kuŝi, kuŝigi',
sitzen, setzen; *sitta, sätta*; *sit, set* 'sidi, sidigi',
fallen, fällen; *falla, fälla*; *fall, fell* 'fali, faligi',
stehen, stellen; *stå, ställa*; (*stand; set, put*) 'stari, starigi'.

Ni vidas ke en tiuj kazoj al la ŝanĝo de vokalo en la ĝermanaj verboparoj respondas almeto de la sufikso *-igi* en Esperanto. Oni povas spekulativi ĉu tiuj paroj donis al Zamenhof la modelon por la paroj *vidi, vitti*, *odi, otti*, kvankam la rilato ne estas la sama.

Kial Zamenhof ne konservis tiujn parojn? Jen lia propra respondo (Zamenhof 1948, vol. I:352; 1987:21): "Poste venis periodo de reago. Konsciante, kiel terure malfacila estos la propagando en la unuaj jaroj, kaj konsciante, ke rompi la unuan glacion mi povos nur en tia okazo, se mi prezentos al la mondo ion *eksterordinare facilan*, mi komencis per ĉiuj fortoj premadi la antaŭe ekzistantan lingvan materialon,

[3]En Waringhien 1959:46 estas donita la formo *vitti*, kiu kredeble estas la ĝusta.
[4]En Waringhien 1959:46 estas donitaj la formoj *odi, otti*, kiuj kredeble estas la ĝustaj.
[5]En la teksto estas donita la traduko 'pruvi', kiu certe estas eraro por 'provi'.

elĵetadi ĉiun 'balaston', t.e. ĉiujn vortojn kaj formojn, kiuj por la unua komenco ne estis nepre necesaj, kaj celadi al tio, ke la tuta lingvo, necesa por la unua tempo, trovu lokon sur malgranda folieto."

Temas do pri la unua komenco kiam li devis prezenti sian lingvon al la publiko, kaj pro la necesa eksterordinara facileco li evidente volis pli proksime sekvi naci-lingvajn ekzemplojn, kiel *vidi, rigardi*, prefere al pli skemismaj solvoj kiel *vidi, vitti*. Evidente la problemo de transitiveco ne estis lia unua okupo, sed la ekzemploj montras ke li en la publikigita formo de Esperanto preferis paŭsi naciajn lingvojn kiam temis pri similaj demandoj.

La sufiksoj *-igi* kaj *-iĝi* ekzistis jam en praesperanto en la formoj *-igi* kaj *-idźi*: *plenigu* 'plenigis', *perigò* 'pereigu' kaj *fakti* → *faktidźè* 'fari → fariĝas', *vidi* → *vididźà* 'vidi → vidiĝis' (Zamenhof 1987:22, Waringhien 1959:25, 29, 31).

En praesperanto ekzistis ankaŭ sufikso por verbigi substantivojn, nome *-iśi*: *rajo* → *rajiśè* 'radio → radias' (Zamenhof 1987:22s, Waringhien 1959:25). En la nuna Esperanto tia sufikso ne ekzistas: oni plej ofte verbigas substantivojn senpere, t.e. per anstataŭigo de la substantiva finaĵo *-o* per verba finaĵo.

6. La efikoj de la prefiksoj *preter-, tra-* kaj *trans-*

Por mia studo de la verboj mi listigis ĉiujn verbojn kiuj estiĝas de radikoj en la Fundamento de Esperanto kaj estas registritaj en la Plena Ilustrita Vortaro (PIV). Tio signifas ke la listo enhavas ĉiujn primitivajn fundamentajn verbojn kaj ĉiujn derivitajn kaj kunmetitajn verbojn en PIV kies ĉefelemento estas fundamenta.[6]

Mi ne listigis verbojn kiuj estas derivitaj per la sufiksoj *-igi* kaj *-iĝi*: ilia transitiveca stato estas ja evidenta.

Kelkaj afiksoj neniam ŝanĝas la transitivecon, kaj verbojn formitajn per ili mi ne listigis. Unue menciindas la aspektaj *ek-* kaj *-adi* (*ekmovi, ekvidi*; *faradi, ondadi*). Same *mal-* (*malobei, malplaĉi*), *mis-* (*miskopii, mispaŝi*) kaj *re-* (*repagi, reiri*) ne influas la transitivecon. Ankaŭ la malplifortiga *-eti* (*tuŝeti, rideti*) kaj la plifortiga *-egi* (*premegi, miregi*) kompreneble ne havas iun efikon rilate al la transitiveco. La sama validas pri la sufikso *-aĉi* (*faraĉi, revaĉi*) kaj la prefikso *fi-*. Sed mi jes listigis derivitajn verbojn kiam ili ne venas de verboj, ekzemple *maloportuni*, kiu ja devenas de la adjektivo *oportuna*.

La vortklasojn mi notas tiel: *t* transitivaj verboj, *n* netransitivaj verboj, *s* substantivoj, *adj* adjektivoj, *adv* adverboj, *prep* prepozicioj, *konj* konjunkcioj, *interj* interjekcioj, *num* numeraloj, *pref* prefiksoj, *suf* sufiksoj. Per majusklo, *T*, *N*, *S*, *Adj* ktp., mi signas la subklasojn de primitivaj vortoj, t.e. tiuj kiuj estas nek derivitaj nek kunmetitaj. La formulo $S \rightarrow n$ do signifas ke el primitiva substantivo (elemento de la klaso S) estiĝas netransitiva verbo (elemento de la klaso n); unu ekzemplo estas *fulmo* → *fulmi*.

Kelkajn observojn ni povas nun facile fari. La klaso T estas pli ol duoble pli granda ol la klaso N. La transformo $T \rightarrow t$ havas multajn ekzemplojn, multe pli ol

[6] La listo estas tro ampleksa por esti inkludita en tiu ĉi teksto, sed ĝi estas havigebla de la verkinto.

$N \to n$. Estas aparte interese cerbumi pri la transformoj $T \to n$ kaj $N \to t$, t.e. pri procezoj kiuj ŝanĝas la transitivecon. La unua havas malmultajn kazojn; la dua pli. La verboj kiuj estiĝas per transformo $T \to t$ aŭ $N \to t$ ofte estas de la klaso 1 menciita en sekcio 3.

Ni rigardu iom detale la prefiksojn *preter-*, *tra-* kaj *trans-*.

Ekzistas dek verboj kun la prefikso *preter-* kiuj estas transitivaj laŭ PIV. Kvar estas de la tipo $T \to t$: *preterfroti, preterlasi, preterpafi, pretervidi*; kvin de la tipo $N \to t$: *preterdormi, preterkuri, preterpasi, preterpaŝi, preterveturi*; kaj unu de la tipo $Adj \to t$: *preteratenti.* La jenaj kvin verboj estas netransitivaj: *preterflui, preterflugi, pretergliti, preteriri, pretermarŝi* (ĉiuj de la tipo $N \to n$).

En PIV estas la jena Zamenhofa ekzemplo, kiu montras la transitivecon de *preterkuri*: *rivero, kiu preterkuras urbojn, kastelojn k vinberĝardenojn*[Z]. Sed la rivero ne rajtas – laŭ PIV – preterflui la urbojn, ĉar la verbo *preterflui* estas ja netransitiva!

Ne ekzistas iu logika kaŭzo kial *preterkuri* estas transitiva dum *preteriri* kaj *preterflui* estas netransitivaj. Estus tre simple deklari ĉiujn tiujn verbojn transitivaj. Malgranda lingva reformo, kiu tamen permesus simplan regulon: verbo kun la prefikso *preter-* estas ĉiam transitiva.

La ekzemploj kun la netransitivaj verboj povos resti, ĉar estas permesite uzi ankaŭ *preterkuri* sen objekto.

Alia ekzemplo estas tiu de la perfikso *tra-*. Estas 30 de la tipo $T \to t$, ekzemple *bori* → *trabori.* Estas 12 de la tipo $N \to t$, nome *tradiboĉi, tradormi, traflui, traflugi, trairi, trakuri, tranaĝi, trapasi, travagi, traveturi, travivi, travojaĝi.* Estas registritaj kvar de la tipo $S \to t$, nome *tradandi, tramini, trasonĝi, trasulki.* Sume 46 transitivaj. Kaj, finfine estas kelkaj netransitivaj verboj kun prefikso *tra-*, nome unu sola de la tipo $N \to n$, *tragliti*, kaj kvar de la tipo $S \to n$: *trabutiki, tragutadi, trasomerumi, travintri.*

Ne estus granda ŝanĝo akcepti ke *tragliti* kaj *traguti* estu transitivaj. La aliaj, do *trabutiki*, *trasomerumi* kaj *travintri*, povos resti netransitivaj kun la klarigo ke ili jam enhavas sian objekton.

La prefikso *trans-* aperas en 30 transitivaj verboj (17 de la tipo $T \to t$, sep de la tipo $N \to t$ kaj ses de la tipo $S \to t$), sed nur en du netransitivaj, ambaŭ de la tipo $N \to n$: *transkuri* kaj *transmigri.* Tiujn du lastajn oni povus nomi transitivaj same bone kiel *transiri* kaj *transpaŝi.*

En simila maniero oni povas studi aliajn afiksojn por malkovri regulaĵojn kaj malregulaĵojn en la vortfarado.

7. La prefikso *pri-*

En sia artikolo pri la deveno de Esperanto Zamenhof (1948, vol. I:351; 1987:20) skribas pri la lingvo en la unua tempo: “Ekzistis ekz-e afiksoj por [...] ‘fari koncerne ion (germana *be-*)’ [...].”

Mi ne scias kiun afikson Zamenhof tiam uzis. En la nuna Esperanto tiun rolon ludas, kvankam ne ĉiom laŭregule, la prefikso *pri-*. Ĉar li mencias la germanan prefikson *be-*, ni rigardu ties funkciojn. Ĝi povas indiki ke oni cele faras ion: *sehen,* *besehen* 'vidi, inspekti'; ĝi povas signifi 'provizi per': *Licht, belichten* 'lumo, prilumi'; kaj ĝi iam respondas al la esperanta *-igi*: *feucht, befeuchten* 'malseketa; malseketigi'. Ĝia plej interesa funkcio – por Esperanto! – estas tiu kiu ŝanĝas la objekton: *malen, bemalen* 'pentri, pripentri', *schmieren, beschmieren* 'ŝmiri, priŝmiri'. Ekzistas en la germana multaj tiaj paroj, kaj kelkaj estas malfacile enmeteblaj en iun skemon: *handeln, behandeln* 'agi, komerci; trakti'; *suchen, besuchen* 'serĉi, viziti'; *rechnen, berechnen* 'kalkuli (ntr), kalkuli (tr)'; *kennen, bekennen* 'koni, konfesi'.

La prefikso *pri-* havas laŭ mia analizo tri funkciojn en la nuna Esperanto:

A. Se oni aplikas ĝin al transitiva verbo ĝi povas emfazi la celecon aŭ seriozecon de la ago sen ŝanĝo de la objekto: *trakti* → *pritrakti* (komparu kun la germana *sehen, besehen*).

B. Se oni aplikas ĝin al transitiva verbo ĝi povas ŝanĝi ties objekton: *planti floron* → *priplanti bedon*, *semi grajnon* → *prisemi kampon*, *ŝteli monon* → *priŝteli vojaĝanton*. La akuzativobjekto de la derivita verbo estas iel pli ampleksa ol la akuzativobjekto de la origina verbo kaj povas aperi kiel nerekta komplemento de tiu ĉi (*ŝteli monon de vojaĝanto*).

C. Se oni aplikas ĝin al netransitiva verbo, oni ekhavas transitivan verbon: *pensi* → *pripensi la aferon*, transformo de la tipo $N \to t$.

Mi trovis la jenajn sep verbojn de la tipo A: *pridemandi, prigardi, prijuĝi, prikalkuli, pririgardi, priskrapi, pritrakti.*

En la listo mi trovis la jenajn 26 verbojn de la tipo B: *prifalĉi, priflari, prifosi, prifrapi, prigrati, priĵeti, priĵuri, prikanti, prikonstrui, prikrii, prilevi, primeti, prinoti, pripalpi, pripentri, pripesi, priplanti, prirabi, prisemi, priserĉi, priskribi, priskulpti, priŝteli, pritondi, pritranĉi, priverŝi.*[7]

Fine mi trovis 15 verbojn de la tipo C: *pridisputi, pridubi, prifajfi, priĝemi, prilabori,* (*reprilabori*), *prilumi, primediti, primensogi, priparoli, pripensi, priplori, priservi, prisilenti, priveti, prizorgi.* Similaj estas verboj kiuj estiĝas de primitivaj substantivoj, do de la tipo $S \to t$: *prifriponi, primajstri, pripluvi, priradii, prisekreti.* De la tipo $Adj \to t$ ni havas *priatenti*, kaj de la tipo $N \to n$ ni trovas *prirespondi.*

Ni vidas ke el la verboj en la listo kun la prefikso *pri-* ĉiuj krom unu estas transitivaj. La sola escepto estas *prirespondi.* Nuntempe oni plej ofte anstataŭe diras *respondeci.*

Ni vidas ke la tipo B, kie la objekto estas ŝanĝita, estas la plej multenombra. Kaj la tipo B kaj la tipo C estas produktivaj. (Mi menciis la verbon *priŝmiri*, kiu ne estas en PIV.) Male, la tipo A ŝajnas esti neproduktiva.

8. Senpera verbigo de adjektivoj

Multaj adjektivoj povas esti senpere verbigitaj. Ekzemploj abundas en la parolata Esperanto: el *sata* venas *mi malsatas*; el *necesa* estiĝas *tio ne necesas.* Preskaŭ ĉiuj verboj kiuj estiĝas tiel estas netransitivaj. En PIV tamen troviĝas tre malmultaj el ili. Ni trovas la verbon *verdi*, sed ne *ruĝi* aŭ *blui.*

[7] Koncedite ke la klasado kelkfoje estas necerta.

En PIV mi trovis la jenajn 25 netransitivajn verbojn kiuj estas senpere derivitaj de fundamentaj adjektivoj: *aktivi, alii, diligenti, diversi, elokventi, fieri, frenezi, furiozi, gaji, inklini, ĵaluzi, kaduki, koketi, kulpi, lami, obstini, pleni, pravi, rapidi, sani, sati, sovaĝi, spriti, utili, verdi.*

Ni povas noti ke la sekvantaj tre ofte uzataj verboj mankas en PIV: *klari, necesi, pali, preti, proksimi, sami, varmi*, same kiel *ruĝi* kaj ĉiuj similaj verboj derivitaj de koloradjektivoj, krom la menciita *verdi*. Ŝajnas do ke PIV en tiu rilato ne plu reprezentas la parolan Esperanton. Aliflanke oni ja povas diri ke la senpera verbigo de adjektivoj estas nuntempe tiel kutima afero ke oni ne bezonas registri ĉiujn tiajn vortojn.

Sed ĉar la transformo $Adj \to n$ fariĝis tiel ofta afero, la 13 transitivaj verboj kiuj devenas de adjektivoj povas aperi pli strangaj ol antaŭe. Jen ĉiuj de la tipo $Adj \to t$: *abstrakti, atenti, avari, avidi, detali, egali, favori, kapabli* (mankas tamen ekzemplo kun akuzativobjekto), *kuraĝi* (mankas ekzemplo kun akuzativobjekto), *reciproki, soleni, simili, sperti.*

Nun ni povas starigi problemon pri lingvoplanado. Estus eventuale bone havi gramatikan regulon kiu diras ke verbo derivita de primitiva adjektivo ĉiam estas netransitiva. En la plej granda nombro de la kazoj ĝi ja validas. La uzo de transitiva *egali* povas esti anstataŭigita de uzo per *egali al*: anstataŭ *la valoro egalas nulon* oni diros *la valoro egalas al nulo*. Ekzistas jam tiu tendenco lige kun la uzo de simboloj: mi mem diras *A egalas al B* kaj ne *A egalas B* pro la manko de akuzativfinaĵo ĉe la liternomo. Analoge oni povas diri *A similas al B* anstataŭ *A similas B*. Pro la forta tendenco verbigi adjektivojn oni povas antaŭvidi evoluon en tiu direkto.

9. Konkludoj

Nia diskuto en sekcio 3 montris ke estus eventuale klarige havi kvar klasojn de verboj anstataŭ nur du rilate al transitiveco.

Ni vidis kiel funkcias, tute regule, la sufiksoj *-igi* kaj *-iĝi*, kiuj ŝanĝas netransitivan verbon al transitiva kaj inverse, kaj ankaŭ, kvankam ne perfekte regule, la prefikso *pri-*, unu el kies funkcioj estas transitivigi netransitivan verbon aŭ ŝanĝi la objekton de transitiva verbo. Interalie pro ili la nocioj de transitivaj kaj netransitivaj verboj estas neevitebla trajto en ĉiu pensebla priskribo de Esperanto.

Rilate al la efikoj de la sufiksoj *preter-*, *tra-*, *trans-* kaj *pri-* ni vidis ke kun malmultaj esceptoj ĉiu verbo kiu estas prefiksita de unu el tiuj kvar kaj kiu devenas de primitiva verbo estas transitiva.

La senpera verbigo de adjektivoj estas produktiva procezo, kiu estigas multajn netransitivajn verbojn. La transitivaj verboj derivitaj de adjektivoj konsistigas malgrandan neproduktivan klason.

En la diskuto post la prezento de tiu ĉi studo la 8-an de julio 1994 i.a. la jenaj ĉeestantoj esprimis opiniojn aŭ starigis demandojn pri la problemo de transitiveco: Armando Zecchin, Ian Jackson, Michel Duc Goninaz, Marie Bartovská kaj Luciano Mantaud.

Bibliografio

Abraham, Werner
1988 *Terminologie zur neuen Linguistik.* (2 volumoj.) Tübingen: Max Niemeyer Verlag.

Cash, Rikardo
1992 *Praesperanto, lingvo universala.* Thaumiers: La Kancerklinikoteko.

Comrie, Bernard
1983 *Language Universals and Linguistic Typology.* Oxford: Basil Blackwell.

The Encyclopedia of Language and Linguistics.
1994 (10 volumoj.) Red. R. E. Asher, J. M. Y. Simpson. Oxford: Pergamon Press.

Golden, Bernard
1988 Neinstruebla, nelernebla gramatikaĵo? La transitiveco de verboj en Esperanto. *Esperanto*, novembro, 188–189.
1991 Vidpunktoj pri verba transitiveco en Esperanto. *Bulgara Esperantisto.* Junio 1991, 5–8.

Hergé
1981 *La krabo kun oraj pinĉiloj.* Tournai: Casterman.

Kalocsay, K., & Waringhien, G.
1980 *Plena analiza gramatiko de Esperanto* (PAG). Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

Lock, Norman
1989 Ĉu signifa termino? *Esperanto*, marto, 55.

Plena ilustrita vortaro de Esperanto (PIV).
1970 Red. G. Waringhien. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.

Prytz, Otto
1989 Finfine ne temas pri transitiveco. *Esperanto*, julio-aŭgusto, 131–132.

Towsey, Alan
1989 La transitiveco de verboj en Esperanto. *Esperanto*, marto, 54.

Waringhien, Gaston
